August Heinrich Hoffmann,

La bela kristnaska sonĝo

tradukita de Manfred Retzlaff

Belegan sonĝon havis mi;
tre bela arbo en
salono nia antaŭ ni
sur tablo staris jen.

Sennombra bunta kandelar'
jen brulis ĉirkaŭ ĝi,
plenplena estis la branĉar'
de pom-dekoraci'.

Sukeraj pupoj pendis ĉe
la arbo, tiu ĉi
dekoro pompa estis tre
ĝojiga ja por mi.

Kaj kiam mire staris mi,
min logis forta tent'
ekkapti pomon; tiam ĝi
foriĝis en moment'.

"Ho kristnaskarbo!" vokis mi,
nun vekiĝinte el
la sonĝo, "kie estas vi?"
Ĉirkaŭis min malhel'.

...

”Konduta bone!“, kvazaŭ ĝin
ekaŭdis voki mi.
”Vi tiam ree vidos min;
sed nun ekdormu vin!

Kaj se kondutos bone vi,
pro via obeem’
al vi kristarbon portos Li,
la Sankta Kristo mem.

Traduko de la Germana poemo “Der schöne Weihnachtstraum” de August Heinrich Hoffmann *(Hoffmann von Fallersleben, ∗1798-04-02 – †1874-01-19) en Esperanton de* Manfred Retzlaff *(∗1938-11-04) en 1997-02.*

MR-292-1 / Arg-775-1554 (2013-01-17 16:46:52)